

La heroo vivo de Henri Dunant, 5-a parto
Claude Gacond, 100-a radioprelego, 1964.10.28 & 31

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la kvinan elsendon.

La vera vivo de Henri Dunant decidiĝis la 24-an de junio 1859. Meze de batalantaj soldatoj nia ĝeneva financisto malkovras la profundan sencon de sia homa destino. Liaj okuloj, kiuj vidas tiom da teruraĵoj, malfermiĝas al alia realeco. Li travivas kiel konvertiĝon al kaŭzo, kiun li neniam forlasos kaj kiu plenigos lian tutan penson. Li eĉ forgesos la kialon de sia ĉeesto en la batalejo Solferino.

Ĉu tiu sinteno signifas, ke li forkuras la respondecojn ? Certe ne ! En Solferino Henri Dunant komprenis, ke la profitemo, kiu lin estris, estas la vera kaŭzo de la mizeroj de la homoj : de tiuj vunditoj, kiuj veas sur la batalkampo, de tiuj mizeruloj, kiujn li vizitadis kun sia patrino en Ĝenevo, kaj de tiuj avidemuloj, kiuj neniam ĉesas kuri post la riĉaĵoj. Li vidas la mizerojn de la koloniigitaj araboj kaj komprenas, ke lia ĝishodiaŭa sinteno estas malobeo al la interna voĉo. Tiu voĉo de la konscienco riproĉis al nia heroo la jarojn perditajn por okupoj, kiuj fine nur kondukas al hombuĉado. Ĉu li ne ĵus celebradis la konkerojn de la imperiestroj en la verko, kiun li intencis donaci al Napoleono la tria. Ĉu li eĉ ne proponas en tiu libro la konkeron de la tuta planedo. Kaj ĉion tion li redaktis por akiri personajn profitojn.

Bibliaj paroloj, kiujn li regule meditis, subite akiris por li novan signifon : « *Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ ĉia avideco, ĉar la vivo de homo ne konsistas en la abundeco de liaj posedaĵoj* » ... « *Vendu viajn posedaĵojn, kaj donu almozon ; faru por vi monujojn, kiuj ne fariĝos malnovaj, trezoron... kie ŝtelisto ne alproksimiĝas kaj tineo ne detruas. Ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.* »

La iluzio falas. Dum ĉio estas detruata ĉirkaŭ li, lia propra esto ankaŭ estas atingita. Li komprenas la vanecon de sia vivo de negocisto. La internaj alvokoj reaŭdiĝas : alvoko kuraci la suferantojn, alvoko serĉi rimedojn por konduki la homojn al pli da solidareco intergenta, alvoko ne nur mediti sian religian kredaron, sed ĝin praktiki. Tiuj alvokoj pli laŭtos ekde nun, ol la alvokoj de la administra konsilantaro de la Anonima societo de la Muelejoj Mons-Djémila.

Ĉu tio signifas, ke Henri Dunant estas idealisto, kiu forgesas la realaĵojn ? Ne. Lia agado por la starigo de la Ruĝa Kruco pruvas grandan konon de la homa naturo kaj socia vivo. Henri Dunant subite komprenis, ke ekzistas du realecoj : tiu de la Tero kaj tiu de la Ĉielo. Ĝis nun la iluzia realeco plenigis lian vivon. Kaj li sentas ties senutilecon. Li komprenas la neceson de emancipiĝo el tiu iluzia realeco cele al la naskiĝo al la vera vivo.

Tiu konvertiĝo kondukos Henri Dunant for de la kutimaj pensmanieroj. Tiu ĝenevano, kiu forlasis la sviscon por akiri la francan civitanekon esperante tiel povi pli facile riĉiĝi, evoluos nun al vera homaranismo. Tiu protestanto, kiu fondis la Aliancon de la Junularaj Kristanaj Unuiĝoj iom post iom forlasos la dogmojn de sia religio por alveni al kredo pli universala. Tiu emancipiĝo ne estos facila por homo kutimata obei al severe rigida religio kaj profiti pri facila burĝa vivo.

Sed por Henri Dunant la malkovro de la vera realeco ne plu permesas akordiĝojn kun la iluzia realeco. Oni riproĉos al li tiun sintenon, sed estas ĝi, kiu faras, ke hodiaŭ oni ankoraŭ parolas pri la heroo vivo de Henri Dunant.

Por klarigi tiun religian konvertiĝon de la fondinto de la Ruĝa Kruco, necesas uzi religian terminaron. Por ne malfideli la penson de nia heroo, ni devas kompreni la ekzaktan signifon, kiun li donis al tiuj terminoj. Ekde Solferino Henri Dunant ne plu kredos al postviva aŭ postmorta vivo. Do la du realecoj aŭ du vivoj estas aktualaj. En ĉiu homo ili bataladas, ambaŭ provas venki sur la alian. La karno aŭ korpo batalas kontraŭ la spirito. Hodiaŭ ni dirus, ke la

La heroa vivo de Henri Dunant, 5-a parto
Claude Gacond, 100-a radioprelego, 1964.10.28 & 31

subjektiveco batalas kontraŭ la objektiveco. Kiam homo obeas siajn instinkojn kaj la sociajn kutimojn kaj ne trovas la kuraĝon plenumi sian mision, tiam li estas ne ankoraŭ naskita al la vera vivo. Se la korpa morto venas, tiu homo malaperas entute. Pro tio, li tiom timas la morton aŭ kreas al si la iluziigan esperon pri postmorta ekzisto. Homo devas dufoje naskiĝi : li devas korpe naskiĝi, kaj poste naskiĝi al la spirita vivo. De tiam lia vivo eternas. Estas la trezoro, kie ŝtelisto ne alproksimiĝas kaj tineo ne detruas. Jen por Henri Dunant la Ĉielo.

En Solferino centmiloj da kuraĝaj soldatoj fariĝis subite pli bestaj ol bestoj, ĉar ili obeis al la iluzia mondo. Jen kion subite malkovras Henri Dunant. Tiu nova vido de la realeco kondukas lin al la kompreno de la drameco de la vivo de la homaro. Ĝi donas al la skriboj de la ĝeneva samaritano profetan akcenton. Kelkaj legantoj eĉ parolas pri speco de inspiro, kies motoro estas la sufero de la homoj. Aŭskultu unu el tiuj dolorkrioj de la fondinto de la Ruĝa Kruco :

« Dum pactempo igi vidi per la okuloj, tuŝi per la manoj malfeliĉojn, kiujn oni ne sufiĉe konas ; aŭdigi la voĉon de la homaro igante la feliĉulojn de la tero atentemajn al tiu longa sufera krio, kiu leviĝas el la profundo de la societo kaj kiun tro ofte la kapturigo de la plezuremo malhelpas aŭdi el la supro. »

Ni multobligos la tekstojn de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-